

Recenzeto: Ebbe Vilborg, Etimologia Vortaro de Esperanto, vol. 1-5, Malmö 1989-2001, entute 666 paĝoj.

Antaŭ du jaroj aperis la kvina kaj lasta ero de la “Etimologia Vortaro de Esperanto” (EVE) de Ebbe Vilborg; la unua parto, aperinta en 1989, ampleksas krom “Antaŭparolo” (p. 5), klarigoj pri “Amplekso kaj aranĝo” (p. 6-7) kaj atestoj de Zamenhof pri Esperanta etimologio (p. 15-16) la alfabeterojn *A – D*, la dua, aperinta en 1991, la erojn *E – Ĵ*, la tria, aperinta en 1993 la erojn *K – M*, la kvara, aperinta en 1995, la erojn *N – R*, kaj la kvina, ĵus aperinta, la erojn *S – Z*, krome la gramatikajn kaj vortfaradajn (pseŭdo)afiksojn kaj afiksoidojn (p. 132-179), aldonendajn (p. 180-190) kaj korektendajn (p. 191-193) aĵojn rilate la antaŭajn volumojn, klarigon de gramatikaj esprimoj (p. 194-195), kaj “Postparolon” (p. 196). Ĉiu volumo enhavas listojn de mallongigoj kaj literaturo citata (mankas en la unua kajero). La EVE, enhavanta la oficialajn radikojn, do estas la plej nova kaj plej granda laboraĵo pri Esperanta etimologio kaj etimologiscienco, kaj sendube fariĝos norma vortaro tiurilata.

La artikoloj konsistas el la (kutime PIV-forma) radiko Esperanta, la cito de ties unua apero, la etnolingva(j) fonto(j), la ekvivalentoj en Praesperanto, Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua de I.A.L.A., kaj cito de aliaj samradikaj vortoj Esperantaj. Dubeblokaze la aŭtoro pridiskutas la vorton kaj la citatan aron da tiurilata literaturo kaj fine proponas la laŭ sia opinio plej kredeblan aŭ foje propran solvon kutime konvinkan. Kiu do aĉetintis la relative multekostan EVEon, ne nepre bezonas plian etimologian literaturon Esperanto-rilatan, havante ĉion en unu libro. Al ĉiu, kiun interesas etimologio, mi EVEon ege rekomendas.

La vortaro estas klare aranĝita, detala kaj laŭinde malriĉa je (pres)eraroj - tiuj de la volumoj 1a – 4a ja estas korektitaj fine de la 5a¹, en la kvina ero mi nur trovis eraretojn kiel *kündigen* anstataŭ *verkündigen* (s.v. *-ig/*) aŭ *sufik4soj* (s.v. *-uj/*). La EVE do forme kaj enhave kontentigas.

Kritiki kelkajn punktojn mi devas malgraŭ ĉio laŭdinda. Unue la aŭtoro uzas la malnoviĝintan vortaron de Pokorny por la hindeŭropaĵoj, kio ĉie videblas: ekz. lat. *mittere* (s.v. *met/i*) aŭ hel. *tópos* (s.v. *utopi/o*) ne estas “sen certa etimologio”, sed apartenas al la radiko **meiθ₂* “ŝanĝi, forigi”, kp. LIV s.v., resp. verŝajne al **tep* “esti varm(eg)a” (kiel origine “varma ejo”), kp. M. Meier-Brügger en *Glotta* 74, 1998, 99-100; ĝerm. **warma-* (s.v. *varm/a*) ne apartenas al adjektivo **g^{nh}ormo⁻²*, sed al latva *wersme* “varmego”, kp. Seebold, *Lautgeschichte*, 446-448 kaj Heidermanns, *Adjektive*, 660. Nature mankas en la pokorniaj rekonstruaĵoj laringaloj, do oni anstataŭigu **reg* (s.v. *reĝ/o*) per **h₃reg¹*, **dô* (s.v. *don/i*) per **deh₃* ktp.

Mi plie volas rimarkigi, ke *sanskrita* ne egalas al *antikva hinda*, estas nur speciala lingvo literaturo; se la aŭtoro citas vorton kiel *gharmá-* -do kun ekstersanskrita akcento-, li ne rajtas nomi ĝin *sanskrita*.

La plej grava kritikendaĵo estas laŭ mia opinio, ke la aŭtoro ne observas la internacie kutimajn transskribsistemojn, ekz. por la helena aŭ rusa, eĉ ne la polan ortografion (ne ekzistas en EVE diferencigo de *z* kaj *ž* aŭ de *q*, *ę* kaj *a*, *e*). Li anstataŭ uzas kiel eble la Esperantan alfabeton kaj kromliterojn, sed la rezulto estas konfuza por spertuloj lingvistikaj kaj neekzakta: ekz. *crngaveram* (s.v. *zingibr/o*) anstataŭ *ŝr̥ngavera-*, *k'lopotač* (s.v. *klopod/i*) anstataŭ *klopotač* ktp. Ankaŭ ne distingatas la he. palatalaj tektaloj de la velaraj, ekz. **gno* (s.v. *kon/i*; mankas krome la streko kuŝanta) anstataŭ **g^hneh₃* ktp.

Mi ne volas tro riproĉi la aŭtoron, laŭ propra deklaro nefakulon pri hindeŭropa lingvoscienco; tiun malkonvencaĵon certe kaŭzis la malfacilaĵoj rilate specialajn skribsignojn, kiuj nun danke al la komputilo ne plu gravas, kaj eble la kutime nelingvistika legantaro esperantista³. Malgraŭe en dua eldono estonta de EVE pro la scienceto kaj ekzakteco oni nepre observu la transskribkonvenciojn, kaj laŭeble aktualigu la hindeŭropan rekonstruaĵojn. Mi volonte kunlaboros kun la aŭtoro por tio.

Resume mi ree ege rekomendas EVEon, por ontaj eldonoj mi deziras nur ŝanĝon de la supraj etaj kritikendaĵoj, kiuj tamen ne damaĝas la valoron kaj strukturan ĝustecon de la vortaro.

La esperantistaro devas danki al Vilborg por lia peno kaj por tio, ke la Internacia Lingvo nun ankaŭ kiel “ĉiu iom grava lingvo havas sian etimologian vortaron”.

Cyril Brosch, Würzburg

Literaturaj mallongigoj:

-*Adjektive*: F. Heidermanns, “Etymologisches Wörterbuch der germanischen Primäradjektive”, Berlin/New York 1993

-*Glotta*: Glotta – Zeitschrift für lateinische und griechische Sprache, Göttingen

-*Lautgeschichte*: M. Mayrhofer, M. Peters, O.E. Pfeiffer (eld.), “Lautgeschichte und Etymologie. Akten der VI. Fachtagung der Indogermanischen Gesellschaft, Wien 24-29. September 1978”, Wiesbaden 1980

-*LIV*: H. Rix, M. Kümmel, Th. Zehnder k. a., “Lexikon der indogermanischen Verben”, 2a eldono Wiesbaden 2001

¹Mi nur ne scias, kial germ. *Cousin* (III s.v. *kuz/o*) estu “arkaiĝinta aŭ malofte uzata vorto”.

²Tiel; **g^{wh}ermo-* (“**gūhermo-*”) estiĝus ĝerm. †*berma-*(!), ahind. †*harmá-*.

³Kvankam ĉi tie verŝajne pli da spertuloj oni atendi povas, temas ja ne pri beletristiko.